

# PETRA EN LA BABELTURO

**La juna hungara instruistino Petra Smidéliusz kolektas grandajn sukcesojn en la argentina ĉefurbo Bonaero.**

BONAERO, 20.05.2011. La titolon “Monda Ĉefurbo de Libro 2011” ricevis de Unesko la argentina ĉefurbo. Tial ĝia jam kutime vigla kultura vivo des pli brilas nun per aldonaj eventoj. Unu el ili aparte allogas vizitantojn: libra Babelturo. Ĝin kreis la ekscentra skulptistino Marta Minujín, kiu iam inventis “rompendajn skulptaĵojn” kaj rekonstruis en Novjorko hamburgeran Liberec-statuon. Ĉi-okaze ŝi decidis restarigi la Babelturon... per libroj. Temas pri 30000 titoloj el la plej diversaj lingvoj. Ili kovras gigantan strukturon metalan ĉirkaŭ spirala ŝtuparo. Irante supren kaj suben en la instalaĵo, la vizitanto rigardas al miloj da libroj, kiuj pendas en travideblaj plastaj sakoj, kaj ripete aŭdas la vorton “libro” diverslingve, diversvoĉe. La librojn la artistino ricevis el ĉiuj landoj de la mondo tra iliaj ambasadoj. Esperantujo ne bezonis ambasadejon: Argentina Esperanto-Ligo transdonis, pere de sia prezidantino, Silvia Rottenberg, librojn ankaŭ en la Internacia Lingvo. Ŝi persone enmanigis al la artistino ekzempleron de la pasintjare tie aperinta *Esperanto ¿Una cura para las heridas de Babel* (Esperanto, ĉu kuraco por la babelaj vundoj?) de Andrés Battig kaj Roberto



Petra Smidéliusz prezentas Esperanton ĉe la babela turo. Foto: Silvia Rottenberg

Sartor. Poste ŝi ripetis la geston kun la kulturministro Hernán Lombardi kaj la guberniestro de la Aŭtonoma Urbo Bonaero, Mauricio Macri.

## Laborema vizitantino

Tiu ĉi kulturfesta etoso estas pli ol oportuna por la disvastigo de tiel libra lingvo, kia estas Esperanto. Tial Silvan akompanas ĉien instruistino Petra Smidéliusz: jen por rapida Esperanto-kurso, jen por intervjuo en vaste aŭskultata radiostacio. Diplomita profesoro pri la hispana kaj angla lingvoj en Budapeŝto, Petra nun rondvojaĝas tra Sudameriko. Instruante Esperanton diversnivele en Brazilo kaj vizitante ankaŭ Ĉilion, ŝi nun gastas en la lulilo de tango. “*Marde mi*

*donis prelegon en mezlernejo por 200 gejunuloj... kiam mi parolis pri Pasporta Servo, multaj ĝojkriegis kvazaŭ ĉe piedpilka matĉo. Multaj ekinteresiĝis kaj volas lerni Esperanton. Mi ankaŭ gvidos tri malfermajn lecionojn ĉe la turo... hodiaŭ mi organizis junularan kunvenon. Sabate mi gvidos kurseton por instruemantoj*” —rakontas la juna hungarino en hieraŭa retmesaĝo.

Fine de majo oni malmuntos la turon kaj tiam ĉiu vizitanto rajtos forporti unu libron. La cetero eniros la trezoron de la unua multlingva biblioteko starigota en Bonaero. La Esperanto-instruistinoj oni ne rajtos kunpreni.

Francisco L. Veuthey  
Dokumentujo de [www.edukado.net](http://www.edukado.net)



La libra Babelturo staras en placo San Martín, kore de Bonaero. Dekstre: Artistino Marta Minujín ricevas E-libron de AEL-prezidantino Silvia Rottenberg. Fotoj: Pablo León

